

Kiel funkcias Unesko ?

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-855/353, 1980 februaro 28, marto 01
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1980-54/SRI-1980-54-A-2-353-855-1980-02-28-03-01-Claude-kaj-Andree-Gacond-Kiel-funkcias-Unesko.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Unesko ĵus eldonis prospekton en Esperanto, kiu provas komprenigi, kio ĝi estas, kion ĝi faras kaj kiel ĝi funkcias. UEA, kiu kunlaboris por la esperantigo de tiu ĉi dokumento, aldonis ĝin al la decembra numero de sia revuo, kiu ĝuste raportis pri la kvarona jarcento de la Unesko-Rezolucio pri Esperanto.

A.- Pro tiu ĉi Rezolucio de la 10-a de decembro 1954 kaj ĉar UEA havas la statuson de konsultebla asocio fare de Unesko, la esperantistoj sufiĉe ofte aŭdas almenaŭ la nomon mem de la organizaĵo de Unuiĝinta Naciaro pri Edukado, Scienco kaj Kulturo. Tio signifas, ke tre verŝajne la esperantistoj estas iomete pli bone informataj pri la celoj kaj aktiveco de Unesko, ol la ĝenerala publiko. Sed ĉu ni vere konscias, pri la giganta laboro, kiun efektivas Unesko? Ni dubas. Kaj ni eĉ timas, ke la plimulto el ni eĉ ne legos la Unesko-prospekton esperantlingvan, kiu ĝuste alportas utilajn sciigojn pri tiu ĉi aktiveco.

Cl.- Tial ni opinias utile citi el tiu ĉi informilo, legante unue el la konkluda ĉapitro, kiu diras "Kiel funkcias Unesko":

A.- Unesko estas la Ŝtatoj Membroj; ĝi funkcias en ili, per ili kaj por ili. La Ŝtatoj instrukcias: la Sekretariato plenumas.

Cl.- La plej supera organo estas la Ĝenerala Konferenco, kiu kutime kunvenas ĉiun paran jaron por decidi agmetodon kaj determini la programon kaj buĝeton por la du venontaj jaroj. La dek-naŭa Ĝenerala Konferenco en Najrobo en 1976 aprobis buĝeton je 224'413'000 dolaroj, al kiu ĉiuj Ŝtatoj Membroj devas kontribui laŭ baremo akceptita de Unuiĝintaj Nacioj. Tiu Ĝenerala Konferenco ankaŭ aprobis la unuan mezlongtempan agadoplanon, kiu difinis por 6 jaroj la celojn de Unesko kaj la rimedojn por atingi ilin.

A.- Inter la sesioj de la Ĝenerala Konferenco, la realigo de la programo estas kontrolata de la Estraro. La Ĝenerala Konferenco, t.e. 142 Ŝtatoj Membroj, elektas ĝiajn 45 membrojn el regionaj grupoj kiel reprezentantojn. Unu estrara funkcio estas proponi iun kiel Ĝeneralan Direktoron, kiam tio necesas.

Cl.- La Ĝenerala Direktoro estas elektita de la Ĝenerala Konferenco por sesjara periodo. La nuna sesa Ĝenerala Direktoro nomita en 1974 estas s-ro Amadou-Mahtar M'Bow, eksministro pri Edukado kaj poste pri Kulturo kaj Junularo en Senegalio. Li estas la ĉefoficulo de la Organizo; estas li tiu, kiu projektas la programon kaj buĝeton, prezentas proponojn al la Ĝenerala Konferenco, kreas la strukturojn kaj nomas oficistojn laŭbezone.

A.- La sekretariato nuntempe entenas anojn el 115, kaj servas al ĉiuj 142, Ŝtatoj Membroj de Unesko. La tiel nomataj "profesiuloj" en la Sekretariejo estas precipe fakuloj, kiuj laboras en "sektoro" respondanta al ilia fako.

Cl.- La Sekretariato estas dividita laŭ 6 “sektoroj” estrataj de po unu Ĝenerala Subdirektoro: 4 “operaciaj” sektoroj (edukado, ekzaktaj kaj naturaj sciencoj, kulturo kaj komunikado, sociaj sciencoj), unu sektoro pri kunagado por evoluigo kaj eksteraj rilatoj, kies rolo iel estas tiu de departemento pri Eksterlandaj Aferoj, kaj unu sektoro por subteni la programon kaj administradon.

A.- La diversecon de la Unesko-laboroj montras la internaj fakoj de la sektoroj - ekologiaj sciencoj, altabetizado kaj kampara evoluigo, homaj rajtoj kaj paco, evoluigo de la komuniksistemoj, se nomi nur kelkajn agadokampojn de la programo.

Cl.- Tamen necesas aliaj servoj por ke la Organizo povu plenumi siajn taskojn. Oficejoj de Internaciaj Normoj kaj Juraj Aferoj zorgas pri la intemaciaj konvencioj (ekz-e, la kopirajto), kiujn Unesko antaŭenigas. Oficejo de Konferencoj, Lingvoj kaj Dokumentoj preparas ĝis po 200 kunvenoj jare. Ekzistas ankaŭ Oficejo de Informatikaj kaj Dokumentaj Sistemoj, Statistika Oficejo, Oficejo de Unesko-presadoj, kiu publikigas pli ol 150 titolojn ĉiujare, kaj Publikinforma Oficejo, kiu i.a. eldonigas en 16 lingvoj Unesko-Kurieron.

A.- Laŭ la vero, Unesko apartenas al la popoloj de la terglobo, kun kiuj ĝi estas multilate rekte ligita. En 128 el la Ŝtatoj Membroj Naciaj Unesko-Komisionoj rilatigas la Sekretariejon tiel kun registaraj servoj kiel kun naciaj grupoj. Unesko ankaŭ havas laborrilatojn kun pli ol 380 neregistaraj organizoj inter kiuj kelkaj, kiel Internacia Konsilio de Sciencaj Unuiĝoj, grave rolas en la realigo de ĝiaj projektoj. Proks. 800 “asociitaj lernejoj” antaŭenigis ĝian idealon de intemacia kunagado; dume, bonvolaj homoj en la tuta mondo rilatas kaj kunlaboras kun Unesko pere de programo ebliganta al privatuloj kaj voluntulasocioj partopreni en “kunhelpaj projektoj”.

Cl.- Kiel reprezentanto de Kultura Centro Esperantista mi estis invitita komence de la vintro partopreni dutagan kunsidon de 1a Svisa Unesko-Komisiono. La raportoj kaj prelegoj, kiujn mi aŭdis okaze de tiu ĉi renkontiĝo min plian fojon konvinkis pri la graveco de la funkcio de Unesko. La hodiaŭa mondo ne havas mond-registaron, sed organizaĵo kiel Unesko tre similas al mond-ministerio pri kulturo, same kiel la aliaj fakaj organizaĵoj de Unuiĝinta Naciaro pli kaj pli plenumas aliajn ministeriajn funkciojn. Fakte ne estas per si mem, ke Unuiĝinta Naciaro estas potenca kaj efika, sed tra la kanalo de siaj fakaj organizaĵoj.

A.- Por doni al vi ideon pri la laboro mem de Unesko kaj pri ĝia varieco kaj universaleco, ni legos la venontan semajnon erojn el la ĉapitro, kion faras Unesko, intigante vin, havigi al vi la Esperanto-prospekton de Unesko kaj ĝin komplete legi.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!